

## & Viro de mia revo:

< Rekante 27 el 53 batoj por strofo, entute 265 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Grigorij Arosev (Literatura konkurso Liro, Kaliningrad 2003). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:53> (

/(mi Lami mido Tiirere reTi La; doododo TiTi La So La doTi La;)×

(#Rekantaĵe: SoLaTi do dodo redo mi; so somi mire re; so soti laso mire mido; So So doTi La Fa So o; SoLaTi do dodo redo mi i)

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 /Viro de mia revo de mia viv'. ;  
Strangas konsci' ĉi tiu – ĉu estas lud'? ;  
Ĉu por la rev' ekzistas kial', motiv'? ;  
Mi fluas peĉe, vakse pro la apud'.

(×:; **Verda folio en arbaret' Flugu per danca tret' ; Kukolon timas rubekolo ; Gardas ovon gxian gxi ; Verda folio en arbaret'.**)

'2 Ĉio leĝere glitas en nia kun', ; mi vin karesas ĝue sen ajna dev'. ; Ĉio palpeble glatas en nia nun', ; viro de mia vivo de mia rev'. .....

'3 Amo de mia vivo de mia rav' – ; ĝi, atendata ĉiam, mem estas rar'. ; Ĝi, mensoganta ofte, mem estas prav', ; ĝi, ofertata kore, mem estas kar'. .....

'4 Vivo de mia revo de mia ver', ; dankon pro la ĉeesto en mia am'. ; Vi estas milda dolĉa amara ber', ; vi ŝajnas la alio, sed estas sam'. .....

'5 Vento de mia monto de mia rur'. ; Mi ne kliniĝas dekstren, ĉar estas liv'. ; Mi tre feliĉas – jen estas mia nur', ; viro de mia revo de mia viv'. .....